

Ora Ĵurnalo

ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGBLAS ĈIUTAGE

Numero 79, Decembro 2024



La kulturrezervejo de Gatenhielm.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	La ruĝgorĝulo	10
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Rödhaken	10
Espeporko meditas.....	3	Laponia trolo-paro	11
La ampelo	3	– <i>Raita Pyhälä rakontas fabelon pri du troloj</i>	
Sidensvans.....	3	Venu kiel volontulo al la Domo de Mateo, <i>Rianna Sanders</i>	12
Meze de la rezervejo "Gathenhielmska", bonvenon!	4	"En la angla mi komprenas proksimume", <i>recenzo de Bo Sandelin</i>	13
– <i>Ingegerd rakontas pri malnova urboparto</i>		Stackars kamel!.....	14
Albumo pri la rezervejo "Gathenhielmska" ...	5	Povra kamelo!.....	14
Bildalbum från Gathenhielmska reservatet ...	5	La Libro-Rondo daŭrigos en januaro kun nova libro	15
Saluto el la Libro-Foiro en la Tago de malliberigitaj verkistoj.....	6	BabilejGPT	17
En hälsning från Bokmässan på Fängslade författares dag	6	La morto.....	18
Jailbird Singers.....	7	– <i>ukraina fabelo tradukita de Ivan Ŝirjaev</i>	
– <i>Ingegerd rakontas pri iama populara muzikbando</i>		Serĉante Kristnaskon en Gotenburgo.....	19
Kungsfågel, <i>Renate Säfström</i>	10	– <i>Ingegerd meditas pri kristnasko en la urbo</i>	
Regolo, <i>Renate Säfström</i>	10	På jakt efter Julen i Göteborg	19

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.

Ora Ĵurnalo n-ro 79 ankaŭ troviĝas en versio por la poŝtelefono ĉe www.esperanto-gbg.org/79



La redakcio deziras al niaj legantoj bonajn festotagojn!



Espeporoko meditas



Foto: Stig Karlsson

- * Porkaĵo ja estas tradicia jula manĝaĵo ekde la vikinga epoko. Mi timas!
- * Pri vikingoj vi povus legi, se vi partoprenos la Libro-Rondon. La unua Zoom-kunveno okazos la 26an de januaro. Akompanu la vikingon **Orm la Ruĝa** en liaj vojaĝoj okcidenten!
- * Fabeloj ja apartenas al Kristnasko. Ĉu ne? **Saliko** mem faris fabelon vidinte laponian trolparon el fadenoj. Provu fari propran julan fabelon por infanoj – veraj aŭ imagitaj.
- * Ankaŭ Ingegerd trovis inspiron de estulo el tekstila materialo – kaj enmetis poemon pri la povra kamelo.
- * *Merry Christmas* salutas nin en ĉiu vendofenestro – kaj la saluton ni komprenas. Male se estas scienca artikolo en temo, pri kiu vi havas sufiĉe grandan konon – almenaŭ leginte ĝin en

la sveda. Pri tiu temo **Bo Sandelin** meditas.

- * La 15an de novembro oni celebras la tagon de malliberigitaj verkistoj. **Davit Isaak** estas viro, kiu longege estas en mallibereco.
- * Nova kontribuanto de artikoloj por Ora Ĵurnalo estas **Rianne Sanders**, Nederlando. Mi ĝojas! Legu pri volontula laboro!
- * Decembro plenas de festotagoj. Ne forgesu ankaŭ celebri **la Zamenhof-tagon**, la 15an de decembro!
- * Ingegerd kaj Lasse Granat serĉis julsignojn en Gotenburgo. Fine de ĉi tiu numero vi trovos la rezulton de ilia serĉo.
- * Lumigu la domojn, la placojn, la preĝejojn, la lernejojn, la mensojn kaj ĝuu la festotagojn! La mondo bezonas lumon! Ĝis januaro! **/Siv**

La ampelo

kovas idojn en norda Svedio, Finnlando, Rusujo kaj pli oriente. Manĝas insektojn, sed vintre berojn. Se mankas beroj ĝi povas invadi aliajn areojn por trovi ekz. sorpojn. Foto: Stig Karlsson, karlssonsnaturfoto.se

Sidensvans

Häckar i norra Sverige, Finland, Ryssland och österut. Lever av insekter, men på vintern av bär. Om det blir ont om bär kan den invadera andra områden för att hitta t.ex. rönnbär. Foto av Stig Karlsson, <https://karlssonsnaturfoto.se>



Meze de la rezervejo "Gathenhielmska", bonvenon!

De Ingegerd Granat



Maristo venas hejmen.

Se vi laciĝus de ĉiuj grizaj kaj malbelaj antaŭurboj en kaj ĉirkaŭ Gotenburgo, jes, mi celas la "milion-programon" en la 1960-aj kaj 70-aj jaroj pri konstruado de apartamentoj por miliono da homoj kaj kiu signifis detruadojn kaj fosmaŝinojn.

Anstataŭe, vi povas iri al la rezervejo "Gathenhielmska", kiu estas unu el la plej bone konservitaj medioj en Gotenburgo el la 18-a kaj la 19-a jarcentoj. Tiu areo situas ĉe placo Stigbergstorget en urboparto Majorna.

Vi nur devas alporti vian imagon kaj promeni inter la malnovaj domoj sur stratoj Pölgatan kaj Allmänna vägen. Provu imagi, kiel sonis tiam, kiu estis tie? kio okazis?

Ekzemple, eble la statuo de Eino Hanski "Maristo venas hejmen" povas doni la bildon de tre ordinara tago, kiam maristo venas hejmen el ŝtormaj maroj kaj rompitaĵoj kaj ŝnuregoj.

La rezervejo situas nur ŝtonĵeton de la rivero Göta älv kaj la gotenburga haveno. Pensu, kia tiam devis esti la vivo, malŝarĝado kaj ŝarĝado, la homoj, kiuj dungigis, tiuj, kiuj ŝvingis adiaŭ kaj tiuj, kiuj restis for.

La aŭtoro kaj aktoro Anders Wällhed verkis plurajn librojn pri la maristo "Stigbergs-Lasse", kiun la statuo prezentas, kaj unu el ili nomiĝas "La kantoj de Stigbergs-Lasse, kantitaj kaj nekantitaj", eble ni ricevos la tutan "Vivon de maristo" kaj ties malfacilaĵojn kaj suferojn tie priskribitajn. Eble ambaŭ forirojn, revenojn kaj nerevenojn.

Ĉi-lasto estas bone priskribita per "la edzino de la maristo", kiu staras ĉe la supro de la turo de la Mara muzeo kaj krias sian sopiron kaj sian angoron super la haveno kaj la maro.

Se ni eksoifos dum la promenado, troviĝas meze de la rezervejo malnova akvofontano, kiu certe kvietigis multajn soifojn. Kelkajn paŝojn for estas la rendevuejo "Gamla Majgrabbar" (Maljunaj knaboj de Majorna), estas ankaŭ "Gamla Majflickor" (Maljunaj knabinoj de Majorna). Ĝuste nun ili prepariĝas por "Kristnasko en la rezervejo".

Malnovaj, parte eriĝintaj ankroj troviĝas en speciala loko. Ili memorigas pri tre malnovaj velŝipveturoj. Oni preskaŭ aŭdas, kiel la ondoj frakasas kaj kiel la ŝtormoj hurlas antaŭ longe kaj ke la granda arbo, kiu etendas sian

kronon super la malnovaj ankoj, flustras
siajn historiojn el pasintaj tempoj.

Nun ni levas la ankron kaj ekiras al novaj
aventuroj.

Albumo pri la rezervejo "Gathenhiemska" Bildalbum från Gathenhiemska reservatet



*La asocio de la Maljunaj
knaboj de Majorna. –
Föreningen Gamla Majgrabbar.*




*Vivo kaj movado en la rezervejo de
Gathenhielm. – Liv och rörelse i
Gathenhiemska reservatet.*



*Ĉi tie ni ĵetas la ankron. – Här kastar vi
ankar.*

Saluto el la Libro-Foiro en la Tago de malliberigitaj verkistoj

En hälsning från Bokmässan på Fängslade författares dag



En la 15-an de novembro ĉiujare, la Tago de malliberigitaj verkistoj estas festata tra la mondo, laŭ iniciato de Sveda PEN. Ĝi estas okazo por atentigi pri la malfacilaĵoj de enkarcerigitaj verkistoj, protekti la esprimliberecon kaj protesti kontraŭ ĝiaj subpremantoj.

Samtempe, **Dawit Isaak** estas premiita la Edelstam-premion 2024 "pro siaj elstaraj klopodoj kaj escepta kuraĝo defendi sin por libereco de esprimo, liaj konvinkoj kaj la defendo de homaj rajtoj". Dawit Isaak estas la ĵurnalisto kiu, kune kun siaj kolegoj, estas malliberigita la plej longe en la mondo – li estas tenita izole sen akuzo aŭ aliro al jura reprezentantaro aŭ proceso dum pli ol 23 jaroj. La premio de Edelstam estas aljuĝita pro esceptaj klopodoj kaj granda civila kuraĝo en la batalo por homaj rajtoj.

En la Librofoiro staras, kion vi eble scias, ĉiam du seĝoj malplenaj atendante niajn favoratajn gastojn: unu por Dawit Isaak, kaj unu por **Gui Minhai**. Ambaŭ fariĝas 60-jaraj ĉi-jare, kaj ambaŭ estas malliberigitaj dum tro multaj el tiuj 60 jaroj – ili maltrafis siajn naskiĝtagajn festojn. Ili maltrafis sunleviĝojn, somerajn matenojn kaj novembrajn pluvojn sub la kolumo. Povi levi sian voĉon en aferoj, kiuj estas gravaj por ili. Meti vortojn sur paperon. Por vidi kaj teni tiujn, kiujn oni amas.

Tiu ĉi estas grava tago

En pluraj partoj de la lando, la Tago de malliberigitaj de verkistoj estas observata kun

Den 15 november varje år, högtidlighålls Fängslade författares dag runt om i världen, på initiativ av Svenska PEN. Det är ett tillfälle att uppmärksamma situationen för fängslade författare, att värna om yttrandefriheten och att protestera mot dess förtryckare.

Samtidigt tilldelas **Dawit Isaak** Edelstampriset 2024 "för hans enastående insatser och exceptionella mod i att stå upp för yttrandefriheten, sin övertygelse och försvaret av de mänskliga rättigheterna". Dawit Isaak är den journalist som, tillsammans med sina kollegor, suttit fängslad längst i världen – han har hållits isolerad utan åtal eller tillgång till juridiskt ombud eller rättegång i mer än 23 år. Edelstampriset delas ut för exceptionella insatser och stort civilkurage i kampen för mänskliga rättigheter.

På Bokmässan står, som ni vet, två stolar alltid tomma och väntar på våra drömgäster: en för Dawit Isak, och en för **Gui Minhai**. Båda fyller 60 i år, och båda har suttit fängslade i allt för många av de 60 åren – de har missat sina födelsedagsfiranden. De har missat soluppgångar, sommarmornar och novemberregn under kragen. Att få höja sin röst i frågor som är viktiga för dom. Att få sätta ord på papper. Att få se, och hålla om, de man älskar.

Detta är en viktig dag

På flera håll i landet uppmärksammas Fängslade författares dag med uppläsningar,

recitadoj, prelegoj kaj interparoloj. En Gotenburgo ĉi-jare, la fokuso estis sur la situacio en Bangladeŝo kaj la gravaj limigoj al sinesprimlibereco en tiu lando. Tiu ĉi programo okazis 16 novembro, en la Urba biblioteko en Gotenburgo, organizita de Sveda PEN, la Urba biblioteko, Göteborgs Litteraturhus (la Literatura domo de Gotenburgo), kaj Författarcentrum Väst (Okcidenta centro por verkistoj). La programo estas parto de Litteraturstaden Göteborg (la Literatura urbo Gotenburgo). Se vi havas la okazon altigi vian voĉon por ĉiuj enkarcerigitaj verkistoj de la mondo, kiuj mem ne povas fari tion – faru tion.

Jailbird Singers

de/av Ingegerd Granat

De dekstre/Fr.höger: Tore "Masen" Eliasson, Karl-Åke "Korpen", Johnson kaj Tony Granqvist (foto: Lennart Gullberg).

La sagao de "Jailbird Singers" komenciĝis kiam Tony Granqvist kaj Tore "Masen" Eliasson renkontiĝis ĉe Roxtuna en 1956. Tio estis malliberejo por junuloj. Kio kunigis ilin estis ke ili estis kondamnitaj al junulmalliberejo kaj ke ili estis muzike talentaj.

Roxtuna, siavice, estis novkonstruita, tamen pridiskutata, institucio por tre ŝarĝitaj krimaj knaboj kun psikiatria problemoj. La hodiaŭaj diagnozoj ne ekzistis tiutempe. Ĉe Roxtuna estis kvalifikita personaro, inkluzive de Tomas Tranströmer. Tomas iĝis Nobel-premiito pli malfrue en la vivo, kiel ni ĉiuj verŝajne scias. La kunlaborantaro vivis en stabloĝejoj proksime.

En la institucio kie Tony, en aĝo de 18, kaj Thore, en aĝo de 19, renkontiĝis, ekzistis muzikĉambro kie la knaboj renkontiĝis kaj ludis. Tony venis de bonhava familio en

föreläsningar och samtal. I Göteborg ligger i år fokus på situationen i Bangladesh och de allvarliga inskränkningarna för yttrandefriheten i landet. Detta program ägde rum den 16 november på Stadsbiblioteket i Göteborg, i arrangemang av Svenska PEN, Stadsbiblioteket Göteborg, Göteborgs Litteraturhus, och Författarcentrum Väst. Programmet är en del av Litteraturstaden Göteborg. Har du möjlighet att höja din röst för världens alla fängslade författare som inte själva kan göra det – gör det.



Sagan "Jailbird Singers" började när Tony Granqvist och Tore "Masen" Eliasson träffades på Roxtuna 1956. Detta var en kriminalvårdsanstalt för unga. Det som förenade dem var att de var dömda till påföljden ungdomsfängelse och att det var musikaliskt begåvade.

Roxtuna var i sin tur en nybyggd omdiskuterad anstalt för tungt belastade kriminella pojkar med psykiatrisk problematik. Dagens diagnoser fanns inte på den tiden. På Roxtuna fanns kvalificerad personal där Tomas Tranströmer ingick, Tomas blev ju senare i livet nobelpristagare som vi alla kanske vet. Personalen bodde i personalbostäder i närheten.

På anstalten där Tony, 18 år, och Thore, 19 år, träffades fanns det ett musikrum där killarna

Stokholmo kie estis revite ke li iĝus inĝeniero. Tony, kiu estis plenigita de muziko, kaj kiel adoleskanto ludis tamburojn en diksi-bando, ne volis tion.

Li krome estis adoptita infano kaj li spertis tion kiel traŭmon Li "deglitis" kaj alvenis en reformejon por junuloj, kaj poste al Roxtuna.

La junaĝo de Thore estis malsama. Li havis patron kun maltrankvilo en la animo kaj eble havis heredaĵon de la cigana gento. La patrino, aliflanke, estis Savarmeo-soldato kaj mortis kiam Thore estis en siaj adoleskaj jaroj. Pluraj en la familio estis muzikemaj.



Thore pasigis siajn sep lerneajn jarojn en ne malpli ol dek kvin diversaj lernejoj kaj komencis okupiĝi pri krimo kaj estis juĝita al junulmalliberejo kaj alvenis en Skenäs, kie li estis malkontenta kaj forkuris. Li estis kaptita kaj metita en la tiam lastatempe konstruitan Roxtuna. Ili daŭrigis sian kriman vojon kaj alvenis en Långholmen (centra malliberejo en Stokholmo), kie ili renkontis Carl Åke "Korpen" Johansson. Li ankaŭ estis muzikema kaj volis esti en la bando.

Oni havis novajn ideojn en la traktado de krimuloj kaj la tri kaptitoj rajtis ekzerci sin kaj sian muzikon dum granda parto de sia puntempo. Imponita prizonpastro, aŭ ĉu estis kunkaptito (fontoj malsamas), informis pri la bando diskokompanion, kies direktoro iris al Långholmen kaj subskribis kontrakton kun la Jailbird Singers, kiun la bando estis nomita.

En Aprilo 1964, la grupo surbendigis ok kantojn, unu el kiuj de Dan Andersson, "Jungman Jansson", estis sukceso. En aŭgusto de la sama jaro, kvar pliaj kantoj estis surbendigitaj. Entute, ĉio rezultigis la

träffades och spelade. Tony kom från en välbärgad familj i Stockholm där man drömde om att han skulle bli civilingenjör. Det ville inte Tony som var uppfylld av musiken, och som tonåring spelat trummor i ett dixieband.

Han var dessutom adoptivbarn och han upplevde detta traumatiskt. Han kom på "glid" och hamnade på en uppfostringsanstalt och ledde vidare till Roxtuna.

Thores uppväxt var annorlunda. Han hade en pappa med oro i själen och hade ett ev. arv från resandefolket. Mamman var däremot frälsningssoldat och avled när Thore var i tonåren. Flera i familjen var musikaliska.

Thore kom att tillbringa sina sju skolår i inte mindre än femton olika skolor och började ägna sig åt kriminalitet och dömdes till ungdomsfängelse och hamnade på Skenäs där han vantrivdes och rymde. Han infångades och placerades han på den då nybyggda Roxtunaanstalten. De fortsatte sin brottsliga bana och hamnade på Långholmen och där träffade de Carl Åke "Korpen" Johansson. Han var också musikalisk och ville vara med i gruppen.

Man hade fått nya tankar i kriminalvården och de tre fångarna fick lov att öva sig och sin musik en stor del av strafftiden. En imponerad fängelsepräst eller om det var en medfånge (källorna talar olika), tipsade ett skivbolag, vars direktör begav sig till Långholmen och skrev kontrakt med Jailbird Singers som bandet kom att heta.

I april 1964 spelade bandet in åtta låtar, varav en av Dan Andersson, "Jungman Jansson", blev en succé. I augusti samma år spelades ytterligare fyra låtar in. Sammantaget resulterade det hela i LP:n "Tjyvballer och barnatro". Deras stora hit blev "Där björkarna susa" av den österbottniska textförfattaren Viktor Sund. En annan känd finsk tonsättare Oskar Merikanto skrev musiken.

"Där björkarna susa" introducerades på svensktoppen i februari 1965. Tony Granquist dog i cancer och fick inte uppleva succén. Andra kända låtar på repertoaren var

longdiskon "Tjyballader och barnatro" (Ŝtelistbaladoj kaj infana kredo). Ilia furoraĵo estis "Där björkarna susa" (Kie la betuloj susuras) de la orientbotnia lirikisto Viktor Sund. Alia fama finna komponisto Oskar Merikanto verkis la muzikon.

"Där björkarna susa" estis lanĉita sur la sveda furorlisto de modkantoj en februaro 1965. Tony Granquist mortis pro kancero kaj ne sukcesis sperti la sukceson.

Aliaj konataj kantoj en la repertuaro estis "Barnatro" (Infana kredo), "Han har öppnat pärlporten" (Li malfermis la perlan pordegon) kaj "Ovan där" (Tie supre).

Eĉ la trubadoro Cornelis Vreeswijk kaj la trubadoroj ĉirkaŭ la kanzonbarĝo "Storken" ekŝatis la personecojn en la bando. Cornelis deklaris ke "Masen" estis la nura kantisto kiu povas kanti baladojn en "la lingvo de ŝtelistoj", miksaĵo de la cigana kaj slango.

Cornelis kaj Masen havis amikecajn rilatojn longe en la 1970-ajn jarojn. Krom la muziko, ili havis komunan intereson pri "bruligitaj kaj distilitaj trinkaĵoj".

Tamen, Korpen kaj Masen daŭrigis siajn krimajn karierojn malgraŭ la muzikaj sukcesoj. En 1966, aliflanke, Masen finis la malliberejan servon definitive. Li eklaboris ĉe paperfabriko. En la muzika sceno okazis rekomenco por "Jailbirds". La tre juna Peter Karlsson engaĝiĝis en la grupo kiel muzikisto kaj ŝoforo.

Sed en Lövsjön en Dalarna, kie loĝis Thore Masen kaj lia kunulino, la ĉirkaŭaj loĝantoj atestas pri sovaĝaj festoj. Fine la polico intervenis kaj forpelis ilin.

Estas strange, ke iu, kiu estis dotita per tiel mirinda muzikeco kaj viviga intereso, elektas sekvi aliajn malpli sukcesajn vojojn kaj finiĝi en malfeliĉo ree. Tamen ĉio havas finon kaj nun ĉiuj en la Jailbird Singers forpasis. Ni povas memori la grupon helpe de Jutubo, kaj pensi, ke ili iam estis tiel grandaj!

Ligiloj/Länkar:

https://www.youtube.com/watch?v=fmCVHVz_nAk (Där björkarna susa)

<https://www.youtube.com/watch?v=pJl5jBPedw> (Laredo)

"Barnatro", "Han har öppnat pärlporten" samt "Ovan där".

Även Cornelis Vreeswijk och trubadurerna kring vispråmen "Storken" fattade tycke för personligheterna i bandet. Cornelis konstaterade att "Masen" var den enda vissångaren som kan sjunga ballader på "tjyvspråk", en blandning av romani och slang.

Cornelis och Masen hade vänskapliga relationer långt in på 1970-talet. Förutom musiken hade de ett gemensamt intresse i "brända och destillerade drycker".



Korpen och Masen fortsatte dock sina brottsliga karriärer trots de musikaliska framgångarna. 1966 muckade dock Masen för gott. Han började jobba på ett pappersbruk. I musiken blev det en omstart med "Jailbirds". En mycket ung Peter Karlsson engagerades i bandet som musiker och chaufför.

Men i Lövsjön i Dalarna, där Thore Masen och hans sällskap bodde vittnar de omkringboende om vilda fester. Till slut grep polisen in och vräkte dem.

Det är konstigt att den som fått en så underbar musikalitet och livgivande intresse väljer att gå på andra mindre lyckade vägar och hamna i olycka gång på gång. Allt har dock ett slut och nu har alla i Jailbird Singers gått ur tiden. Vi kan minnas gruppen med hjälp av YouTube, och tänk att dom var så stora en gång!

Kungsfågel – Regolo

de Renate Säfström

FOTO
FOR LIVES



Oväntat besök i trädgården – Neatendita vizito en la ĝardeno

I november
när höstvind bjuder
alla löv till en sista dans
”ti ti titt ti”
gnidande fina fioltoner
från trädens kronor
En liten gulgrön fågel
vår kära minsting
en Kungsfågel i äppleträdet

En Novembro
kiam aŭtuna vento invitas
ĉiujn foliojn al lasta danco
”ti ti tit ti”
frotantaj fajnaj violontonoj
el la kronoj de la arboj
Eta flavverda birdo
nia kara etulo
Regolo en la pomarbo

La ruĝgorĝulo, aŭ rubekolo, troviĝas ofte en niaj ĝardenoj. Ĝi ne estas tre timema kaj povas aperi saltante antaŭ homoj kaj bestoj por kapti timigitajn kaj ekflugintajn insektojn. Foto: Stig Karlsson, <https://karlssonsnaturfoto.se>

Rödhaken finns ofta i våra trädgårdar. Den är ganska orädd och kan uppträda hoppande på marken framför människor och djur för att fånga uppskrämda insekter. Foto av Stig Karlsson, <https://karlssonsnaturfoto.se>





Mi iam vizitis Laponion kaj tie en la eta akceptejo de la skicentro vidis suvenirojn, inter ili paron da troloj. Mi promesis al mia nepino verki fabeleton pri la paro. Nun mi faris Esperantan version. Mi nomis ilin Ĝojko kaj Ĝojino. /Saliko

Laponia trolo-paro

de Raita "Saliko" Pyhälä

Ĉu vi scias, ke la laponaj troloj ne volas esti fotataj? Ili timas, ke se multaj homoj vidus fotojn pri ili, ili perdus sian internan bonfarton. Tial ili absolute malpermesas fotadon, sed pupetojn pri ili oni rajtas fari kaj per tio rakonti, ke oni havis la bonŝancon renkonti trolojn. La trolo-paro Ĝojko kaj Ĝojino tre evitas homojn, sed se iu hazarde rimarkas ilian hejmeton en la monto-deklivo kaj salutas ilin amike, ili povas eĉ iom interparoli kun li, kondiĉe ke li komprenas trolo-lingvon. Ili mem komprenas ankaŭ ĉies pensojn senvortajn.

Ĝojko kaj Ĝojino ŝatas ekskursi en arbaroj kaj marĉoj. Ofte ili havas kun si sian filinon Ĝojeta. En tiu familio ĉies nomo komenciĝas per Ĝ. Se al ili naskiĝus filo, ili nomus lin Ĝojkesto. Ĝojeta jam havas 12 jarojn. Ŝi ofte sola piediras al siaj gekuzoj, kiuj loĝas eĉ pli alte en la monto. Tion ŝi tamen faras nur somere, ĉar dum la malhela vintra sezono ĉiuj laponaj troloj dormas. Vi eble memoras, ke

ankaŭ la mumino-troloj kutimas tradormi la vintron, kvankam ili loĝas 1000 kilometrojn pli sude.

Antaŭ la vintro Ĝojino kaj Ĝojko diligente serĉas fungojn kaj berojn, semojn kaj manĝeblajn burĝonojn por plenigi siajn ŝranketojn per manĝaĵoj kaj frandaĵoj. En septembro iliaj bretaroj jam plenas de skatoloj, saketoj kaj potoj. Dum tiaj ekskursoj ili devas tre atenti, ĉu ankaŭ homoj serĉas la samon kiel ili. Se ili aŭdas homajn voĉojn, ili rapide retiriĝas en alian direkton. Fine de la ekskurso ili ŝatas fari etan bivakfajron, rosti vegetarajn kolbasetojn kaj boligi trol-kafon en metala poto. Ili rakontas unu al la alia malnovajn fabelojn, kiujn ili aŭdis de siaj gepatroj kaj geavoj. Ili ĝuas ankaŭ kanti kaj zumi melodiojn. La lastaj beroj, kiujn ili serĉas, estas oranĝaj kamemoroj kaj ruĝaj vakcinioj. Kamemoroj ensorbis la somerajn kaj aŭtunajn suno-tagojn, ili enhavas magiajn vitaminojn kontraŭ malvarmumo kaj

malbonfarto. Vakcinioj savas trolojn – kaj homojn – de inflamoj kaj malgaja animstato. Suduloj grimacas, se ili gustumas tiujn berojn sen sukero, sed la troloj nur ridas kaj diras, ke la acidaj beroj agrable jukas la palaton. La ridado de trolo sonas tiom amuze, ke ĉiuj ĉeestantoj ekridas kun ili, kaj tio plaĉas al ĉiuj.

Antaŭ novembro Ĝojino kaj Ĝojko fermas sian etan kaverneton en la monto per dika tavolo de musko kaj likeno. Ili ege esperas, ke Ĝojeta venos hejmen antaŭ tio. La sunlumo ja tute malaperos. La laponaj troloj sentas sin pli kaj pli dormemaj, ili ĉesas trinki kaj manĝi, kovras sin per molaj lano-kovriloj, iom babilas inter si ĝis la palpebroj falos sur la okulojn, kiuj ne malfermiĝos antaŭ februaro-marto. Proksime al ili, en multege pli granda nesto kutime dormas granda bruna ursino kun siaj unu aŭ du idoj. Ankaŭ la ursoj ja vintrodormas, sed la virurso volas dormi sola en aparta nesto.

Dum la vintra solstico kaj Julo (Kristnasko de homoj) la ursoj kaj troloj eble rulas sin sur la alian flankon, ridetas iel sentante, ke okazas iu ŝanĝo en la malhelo ekster la nesto. Prapatroj ja diris, ke la suno tiam restas en sia nesto dum kelkaj tagoj kaj post tio revenos pli proksimen al la nordo, por tie somere lumi tage kaj nokte. Tio ne subite okazas, sed malrapide, malrapide, kaŝe. Tagon post tago la lumo pliiĝas kaj la dormo de ursoj kaj troloj fariĝas pli leĝera. Kiam la neĝo degelas kaj la

suno varmigas eĉ tra la musko-pordo, estas jam la tempo malfermi la okulojn.

Somere Ĝojino kolektas harojn, lanon kaj plumetojn, kiujn ŝi hazarde trovas dum siaj ekskursoj. Ŝi ŝpinas molan fadenon, ŝia ŝpinilo ne estas pli granda ol via mano. Ŝi petas Ĝojkon helpi kaj teni la fadenfaskon tial, ke ŝi povas volvi la fadenon en "bulon", kiu iom similas al elasta mola pilko. Tiun laboron la trolo-familio faras dum pluvo-tagoj en aŭgusto kaj frua septembro. Poste Ĝojino kaj Ĝojeta trikas sveterojn, puloverojn, veŝtojn, ŝtrumpojn, gantojn, ĉapetojn, lanajn kusenojn kaj kovrilojn. En tiu ĉi nia familio okazis, ke ankaŭ la patro, Ĝojko, volis lerni triki. Li provis, provegis kaj finfine lernis. Estis tre agrable sidi trikante kaj interbabilante, bruligi trol-kandelojn kaj rigardi tra la malferma enirejo la forajn, ĉiam pli kaj pli bluajn montojn.

Pri kio la troloj sonĝas dum la longa vintrodormo? La sonĝojn ili bone memoras printempe. Dum la longa suna somero ili distras unu la alian per la novaj rakontoj, kiujn ili sonĝis vintre. En pluraj iliaj sonĝoj aperas Ĝojkesto, la esperata kaj dezirata fileto, sed aperas ankaŭ ursidoj, birdoj kaj birdidoj, boacoj, cignoj, gruoj, amikaj kaj ludemaj koboldoj, feinoj. Ofte en la sonĝoj aperas la sopirataj floroj kaj beroj de la somero.

Saliko (2024)

Venu kiel volontulo al la Domo de Mateo

proponas Rianna Sanders, Nederlando



Post la tragika forpaso de sia filo Mateo pro depresio en 2018, Alex Humet decidis fondi specialan domon en Corbion, landlime kun Francio en la belgaj Ardenoj, kie homoj povus ripozi en trankvilo kaj paco, kiujn la domo elradias, kaj kune kunlabori.

Ĝi estos malferma por esperantistoj kaj ne-esperantistoj, sed unue devas esti renovigita. La

laboro komenciĝis en novembro ĉi-jare, kaj la malfermo de "La Domo de Mateo" okazos en marto 2025.

Nun venas nia peto: se vi volas kaj povas helpi farbi la domon kaj plenumi aliajn taskojn por pretigi ĝin, vi estos bonvena!

Pluraj litoj estas disponeblaj en apuda domo kaj krom kvar horoj da laboro tage, estos ankaŭ multe da spaco kaj tempo por kune, aŭ sole, fari aliajn aktivaĵojn, kiel promenadon, muzikumadon aŭ tabloludadon. Por registri vin kaj por ricevi pliajn informojn, vi povas sendi retmesaĝon al Alex Humet: alex.humet@yahoo.com

El OpenStreetmaps



"En la angla mi komprenas proksimume"



"Troviĝas amaso da esploroj, kiuj montras, ke oni lernas malpli dum certa tempo, se oni ne rajtas lerni per sia gepatra lingvo", konstatas Ola Håkansson kaj Peter Svensson en la libro *På engelska förstår jag ungefär: om anglifieringen av svensk högre utbildning* (En la angla mi komprenas proksimume: pri la angligado de sveda supera edukado). Temas pri tio, ke iom post iom la angla anstataŭas la svedan kiel instrulingvo en bazaj universitataj kursoj en Svedio.

La aŭtoroj serĉas la kaŭzojn, kial la elekto de instrulingvo ne adaptiĝas al rezultoj de pedagogiaj esploroj; ili diskutas la konsekvencojn kaj proponas rimedojn. Ŝajnas ke bona instruado ne estas la sola celo de la decidantoj pri instrulingvo. Ankaŭ gravas ke "la angla kontribuas per ia prestiĝo al la instruado kaj profesio. 'La laboro fariĝis iom pli respektata.'"

Parenca celo, almenaŭ por komercaj altlernejoj, estas akiri ateston, ke oni plenumas la kriteriojn pri aprobo de iu aŭ iuj el tiuj privataj internaciaj organizaĵoj (EQUIS, AACSB, AMBA k.c.), kiuj ekstaris el la komerca ideo kontraŭ alta pago ekzameni ĉu altlernejo estas aprobinda laŭ la kriterioj de la organizaĵo. Neanglalingva instruado apenaŭ estas konsiderata de la ekzamenantoj.

La efikeco en la lernado estas la ĉefa argumento por la sveda en Svedio. Sed ankaŭ tio, ke la plej multaj studentoj estonte laboros en Svedio. Tial en multaj laboroj estas utile koni la svedan socion. Svedlingva kursliteraturo pli ofte ol anglalingva kontribuas al tia scio.

La aŭtoroj montras dilemon: Internacia varbado de instruistoj kaj esploristoj estas necesa por universitato, "kiu volas krei

dinamikan intelektan medion". Tiuj instruistoj ne tuj povas instrui svedlingve, kaj iuj neniam lernas la svedan. Tio ankaŭ kontribuas al la premo angligi la instruadon.

La aŭtoroj akcentas, ke ĝuste sur la baza, bakalaŭra nivelo la sveda estu "preskaŭ sole reganta" instrulingvo. Sur la magistra kaj

doktoriga niveloj la angla estas pli motivita kaj ofte necesa.

Resume, la libro enhavas interesan ekzamenon de gravaj argumentoj. Oni povas kun la aŭtoroj bedaŭri, ke la signifo de la instrulingvo por la efikeco de la instruado estas tiel malmulte atentata.

Bo Sandelin

Stackars kamel! Povra kamelo!

(El "Virrpannans Blogg" en Wordpress)



Kamelens klagan

Grönsiskans lön är socker och frön
papegojan får sallad och sås
och mopsen, det sjåpet, får välja ur skåpet
en kyckling att smörja sitt krås.
Men vem kan bli fet på kamelens diet?
Vem ser om en annan förgås?

Smällfeta kattor får sova på mattor
och fåglarna har i sin bur
för sömnen en pinne och valpen är inne
i korgen i mattes tambur.
Men ingen kan tro hur kamelen får gno,
en annan får sällan en lur.

La lamentado de la kamelo

La salajro de la verda kardelo estas sukero kaj semoj, la papago ricevas salaton kaj saŭcon kaj la mopso, tiu timaĉulo, povas elekti el la ŝranko kokidon por "ŝmiri sian ĵaboton". Sed kiu povas grasiĝi per la dieto de la kamelo? Kiu vidas ĉu mi pereas?

Grasegaj katoj povas dormi sur tapiŝoj kaj la birdoj havas en sia kaĝo por dormi stangeton kaj la hundido estas ene en la korbo en la vestiblo de sia manjo. Sed neniu povas kredi kiel la kamelo devas strebi, mi mem malofte povas havi dormeton.

Vart lamm har sin fälla och höns ska man hålla
med burar av alla de slag.
Man bjuder med krus in kattor i hus
och skyddar en sugga för drag.
Har en annan nån stuga? Nej, öknen får duga,
om än man är gammal och svag.

Vad folk skulle glo om man red på en ko
eller satte sig på en kanin!
Och vem har för vana att sadla en trana,
vem brukar väl sporra ett svin?
Men en annan ska streta med magra och feta
och tiga och hålla god min.

Var orm av naturen är slank till figuren
och läcker är påfågeln glans.
Till och med krokodilen beundras vid Nilen
och ödlan beröms för sin svans.
Men kamelen, den fula, får dras med sin bula.
Vem bjuder en annan till dans?

Ĉiu ŝafido havas sian enfermejon kaj kokidoj
devas esti provizitaj per ĉiaspecaj kaĝoj.
Oni invitas katojn en la domon per trudpeto
kaj protektas porkinon kontraŭ trablovo.
Ĉu mi havas kabanon? Ne, la dezerto devas
taŭgi, eĉ se oni estas maljuna kaj malforta.

Kiel homoj gapus, se oni rajdus bovinon
aŭ sidus sur kuniklo!
Kaj kiu kutimas seli gruon,
kaj kiu kutime spronus porkon?
Sed mi mem devas strebi kun maldikaj kaj
grasaj kaj silenti kaj teni bonan vizaĝon.

Ĉiu serpento estas nature svelta en figuro
kaj bonega estas la grandiozeco de la pavo.
Eĉ la krokodilo estas admirata ĉe Nilo
kaj la lacerto estas laŭdata pro sia vosto.
Sed la kamelo, la malbela, devas toleri sian
ĝibon. Kiu invitas min por danci?

La Libro-Rondo daŭrigos en januaro kun nova libro

Ni jam legis: *Sesdek ok* de Sten Johansson, *Sur bluaj planedoj* de Laure Patas d'Illiers, *La strato de Tanja* de Kalle Kniiivilä kaj *La kurioza evento kun la hundo en la nokto* de Mark Haddon. Ni daŭrigos per *Orm la Ruĝa*.

Bonvenon partopreni! Ni legos po 25–30 paĝojn por Zoom-kunveno ĉiun kvaran

dimanĉon monate. De la 17 h ĝis la 18 h ni diskutos la enhavon kaj ankaŭ okazaĵojn en nia tempo lige al la libraj eventoj.

Se vi volus partopreni bv akiri al vi la libron kaj sendu retpoŝton al mi!

Siv Burell siv.burell@gmail.com

Orm la Ruĝa

Frans G. Bengtsson (1894–1954): *Orm la Ruĝa* (Röde Orm, 1941), el la sveda originalo tradukita en Esperanton de **Bertil Nilsson**. Eldona Societo Esperanto, Malmö 1989.

En la UEA-katalogo: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3685>

Kiel senkosta PDF: <https://libro.ee/file.php?id=1357>

Recenzo de **István Ertl** en Esperanto 1992:
<http://literaturo.esperanto.net/tradukita/ormrugrec.jpg>

Sten Johansson, sveda verkisto kun multaj eldonitaj libroj, origine en Esperanto, faris ĉi tiun recenzon:

Frans G. Bengtsson (1894–1954) estis elstara eseisto pri historiaj kaj literaturaj temoj. Li

ankaŭ verkis beletrajn kaj prozajn kaj poezion. Lia plej grava sukceso estis la historia romano



Orm la Ruĝa (Röde Orm, 1941 kaj 1945) pri aventuroj en la vikinga epoko. Ties plej konata unua parto aperis en esperanta traduko de Bertil Nilsson.

Ĉefa intrigo: La protagonisto Orm kiel junulo estas kaptita de vikingoj kaj senvole partoprenas en rabekspedicio al okcidenta Eŭropo. Sekvas amaso da aventuroj. Interalie li iĝas sklavo kaj remisto ĉe la Andaluza reganto Almansur, de kie li fuĝas post jaroj kaj revenas al Danio, kie okazas famega epizodo dum Jula festenado ĉe la dana reĝo Harald. Sekvas ekspedicio al Anglio, kie li kristaniĝas, edziĝas al filino de Harald kaj revenas al sia hejma provinco Skanio. La dua volumo enhavas interalie ekspedicion al la nuntempa Ukrainio.

Orm la Ruĝa estis granda sukceso inter la legantoj kaj fariĝis sveda klasikaĵo. Ĝi estas tradukita en minimume 24 lingvojn. Ĉe historiistoj kaj literaturistoj oni rigardis ĝin iomete de supre, senkaŭze laŭ mia opinio. Ĝi leviĝas alte super la nivelo de ordinara historiaj aventuroj. Ne hazarde ĝi estas unu el malmultaj svedaj romanoj, kiuj kreis "vortojn kun flugiloj". Antaŭ ĉio ĝi estas tre amuza. Kompreneble ĝi desegnas romantikan bildon de kruela tempo. La aŭtoro miksis historiajn personojn kun herooj el islandaj sagaoj kaj

kun siaj propraj herooj. La vikinga epoko ja foje estis uzata por naciismaj celoj, sed Bengtsson sukcesis en nigra tempo verki romanon tolereman kaj neŝovinisman. La lingvo de la romano estas antikveska, kion la aŭtoro atingis per simplaj rimedoj. Grandparte li estas influita de la lingvo de antikvaj islandaj sagaoj.

Oni povus atendi malfacilaĵojn interpreti tian iom arkaikan lingvaĵon en lingvo kun nur centjara historio. Bertil Nilsson laŭ mia juĝo sukcesis tre bone.

Povas esti, ke Orm la Ruĝa plej multe amuzas skandinavojn, kiuj rekonas la homojn, lokojn kaj etoson. Sed mi kredas, ke ĝi povas interesi kaj amuzi ankaŭ homojn el aliaj landoj, ĉar la vikingoj ja ekspediciis vaste, kaj ilia famo estas eĉ pli vasta.

Oni iam demandis la aŭtoron, kion li celis per la romano. "Nu, nenion tre mirindan", li respondis. "Mi simple volis verki libron legeblan, kiun homoj ne volos tuj forĵeti, tute sen literaturaj pretendoj. Ion similan al Odiseado aŭ La tri muskedistoj."

Ne hazarde tiu komento pensigas pri la drastaj kaj humuraj dialogoj en Orm la Ruĝa.

Sten Johansson

Walter Klag, Aŭstrio, legas multon pri vikingoj – eĉ en la sveda. Mi proponis, ke li partoprenu la Libro-Rondon. Li respondas, ke li jam legis *Orm la Ruĝa*, la unuan volumon, kaj baldaŭ komencos pri la dua. La bildo, kiun li sendis estas pri lia ĵus forsegita kverko. Li skribas:
Por signi la finon mi enĉizis vikingan runon R – vidu la foton!

Mi esperas ke li partoprenos, ĉar lia kono pri vikingoj estus trezoro por la Libro-Rondo. /Siv



BabilejGPT

En la retejo Språkförsvaret (Lingvodefendo) mi trovis en 2 decembro diskutkontribuon, ke ChatGPT misprezantas faktojn (vidu ligilon sube). Tio instigis min provi mem per la ligilo chatgptis.org kaj kontroli, ĉu oni ankaŭ povas elekti Esperanton kiel uzlingvon. Jes, oni povas. Jen mia unua babilo kun "iu", kiu scias

iom pri Esperanto, sed ne ĉion. Ekz. nul okul' pri distingi inter ks, kz kaj x. Provu mem: <https://chatgptis.org> Tie vin bonvenigos ĉarma mastro, kiu almenaŭ provas literumi kaj respondi ĝuste. Oni povas elekti inter multaj lingvoj, de la afrikansa ĝis la zulua, oni alklaku la koncernan flagon. /Inga Johanson

-  Hej, Skriv ditt meddelande för att starta en chatt.
-  esperanto
-  Saluton! Kiel mi povas helpi vin hodiaŭ?
-  ben, vi traktas esperanton kiel komuna lingvo
-  Jes, mi povas kompreni kaj respondi en Esperanto. Ĉu vi havas iun demandon aŭ bezonon pri kiu mi povas helpi vin?
-  Kiom da homoj povas legi kaj kompreni jenan interparoladon?
-  La nombro de homoj, kiuj povas legi kaj kompreni la interparoladon en Esperanto, estas malfacile precize determini. Tamen, la Esperanto-komunumo estas relativa malgranda kompare al aliaj lingvoj, do la nombro povas esti limigita. Tamen, ekzistas fervoraj esperantistoj en diversaj partoj de la mondo, kaj la lingvo estas ofta uzata en interreta komunikado kaj eventoj. Estas malfacile doni precizan statistikon, sed la nombro de homoj, kiuj povas legi kaj kompreni Esperanton, eble estas en la miloj aŭ eĉ pli.

<http://sprakforsvaret.bloggplatsen.se/2024/12/02/11836871-chatgpt-forvranger-information/>

En 6 decembro mi trovis jenajn videojn:

Ludu Esperante per via piano:

https://www.youtube.com/watch?v=Sin_TWvYL8s

aŭ kantu la fabelon pri Ruĝkufolino en Esperanto. Kiel ChatGPT ankaŭ tiu ĉi filmo estas farita per AI:

<https://www.youtube.com/watch?v=lku5pVkJimc>

/Inga J



La morto

(Malgrandrusa fabelo.)

El la malgrandrusa (ukraina) lingvo tradukis I. Ŝirjaev.

Ivan Ŝirjaev (1877–1933) verŝajne verkis la unuan romanon en Esperanto, eble jam en 1904, sed tiu honoro preterpasis lin, ĉar li ne publikigis ĝin. La romano, kun la titolo Sen titolo (<https://libro.ee/file.php?id=333>), estis publikigita nur en 1995. Li tamen publikigis aliajn tekstojn, jen traduko el Lingvo Internacia, n-ro 12 (48), Decembro 1899.

Unu vilaĝano malriĉa havis multe da infanoj: "dudek kaj unu filojn". Post longa pripensado la malriĉulo decidis iri al la reĝo kaj peti helpon por si kaj siaj filoj multnombraj, kiuj post iom fariĝus servantoj de la reĝo – soldatoj. La reĝo donis al li monon, panon, brasiksupon kaj kolbason por la vojo.

Reirante, laciĝinta de longa vojo, la vilaĝano eksidiĝis por ripozo kaj manĝo. Subite li vidas ke iras virino tre maljuna kaj malgrasa. Alproksimiĝinte al la vilaĝano, ŝi ekpetis panon: "donu, homo, panon al mi".



– "Kiu vi estas, maljunulino?" ekdemandis la vilaĝano.

– "Mi estas la morto!"

La vilaĝano timiĝis kaj dedonis al ŝi ne sole la panon, sed eĉ la tutan kolbason. La morto tuj formanĝis la tutan kolbason kaj eĉ ne restigis la ŝnuron, per kiu oni ĉirkaŭligas la finojn de kolbaso. Anstataŭ la manĝaĵo la morto instruis la vilaĝanon kuracadi malsanulojn.

– "Kiam vi venos al malsanulo, do rigardu, kie mi sidas, ĉu apud la kapo, aŭ apud la piedoj de l' malsanulo. Se mi min trovos apud la piedoj, sekve li saniĝos, kaj se mi sidas apud la kapo, tiu homo mortos, – tian homon vi ne peni kuraci. Krom la akvo vi uzu nenian kuracilon.

La vilaĝano ekgojis, kaj baldaŭ la famo pri lia kapableco medicina venis ĝis la reĝo mem.

Subite ekmalsaniĝis la reĝo. Ĉiuj kuracistoj estis senfortaj doni sanecon al la reĝo. Laŭ la konsilo de siaj korteganoj, li alvokis la vilaĝanon, kiu kuracadis per sola akvo pli bone ol ĉiuj doktoroj. Ĉar la morto staris apud la piedoj de l' reĝo, do la vilaĝano-kuracisto tuj sciigis la reĝon ke li saniĝos dank' al la sola akvo. Efektive la reĝo baldaŭ saniĝis. La reĝo riĉigis la vilaĝanon...

Sed la vilaĝano nun fariĝis tre avida: li volis fariĝi pli riĉa. – "Kial mi kuracas ĉiujn per akvo sola? Ne, mi faros kuracilon propran!" diris li. Poste li prenis urtikon kaj herbojn aliajn, metis ĉion tion ĉi en akvon bolantan kaj aldonis al tio ĉi miksaĵo ankoraŭ katon malvivan... La kuracilo nova estis preta. Kaj ree la vilaĝano komencis kuracadi ĉiajn malsanulojn. Sed nun la morto lin punis por lia kuraĝeco. Ŝi de nun fariĝis nevidebla por nia kuracisto. Ŝi diris al li: "Ĉar vi ne obeas al mi kaj ne kuracas per akvo, do vi min ne vidos de nun!"

Tiam la vilaĝano ekvidis malprosperaĵojn. Ne sciante, kie staras la morto, ĉu apud la kapo aŭ apud la piedoj de l' malsanulo, li ne povis diri, ĉu mortos aŭ saniĝos la malsaniĝinta. Kaj post mallonge jam neniu invitadis lin por kuraci.

Fine venis la tago por lia morto. Antaŭ la morto la vilaĝano tre malsaniĝis. Li tiam ekrigardis kaj ekvidis la morton apud sia kapo... Diris li tiam al siaj filoj: "Filoj miaj, turnu mian liton je kapo tien, kaj je piedoj ĉi tien." Ili turnis... Mirinde!... La morto ree staras apud lia kapo. Li ree ekpetis la filojn, ke

ili ree turnu la liton. Kaj la morto ree venis al kapo lia.

Tiam la vilaĝano ekmemoris la malnovan proverbon malgrandrusan: "turnu aŭ ne

turnu, tamen ĉiu homo devas morti" kaj fermis por ĉiam siajn okulojn.

St. Ŝestiĥino, Rybinsko-Bologovskoj ĵel. dor. Selo Vereteja Rusujo.

Serĉante Kristnaskon en Gotenburgo

På jakt efter Julen i Göteborg

de Ingegerd Granat

Unu matenon, kiam mi ŝaltis la radioprogramon P4-Göteborg, mi aŭdis ĵurnalistinon laŭvoĉe deklari: "Nun ĝi estas ĉi tie!" Jes, estas la granda kristnaska arbo sur placo Gustav Adolfs torg, kiu alteriĝis. Ĝi kutime venas per helikoptero kaj estas demetita ĝuste tie. Estas granda tumulto, estas enmetotaj ŝnurlumoj, kaj laboristoj vestitaj en avertaj vestoj jam eniris inter la branĉojn kaj manipulas pri la ŝnurlumoj. La orumitaj marĉevaloj, sur unu el la kvar fantaziaj flagstangoj sur la placo, povas nur rigardi la tumulton. Estis tre venta vetero ĉi-jare, do estas "batalo por la lumo". La radioĵurnalista kun ekscito en sia voĉo peras, ke la kristnaska arbo estas ĉi tie ...



Kiam ni estas survoje al Gotenburgo kaj haltis ĉe unu el ĉiuj senfinaj ruĝaj trafiklumoj, ni vidas kun miro, kiel ankaŭ jul-kobolda ŝargauĉo atendas por ekveturi. La



En morgon, när jag satte på P4-Göteborg hörde jag hur en kvinnlig journalist med hög röst förklarade att: "nu är den här!" Ja, det var den stora julgranen på Gustav Adolfs Torg som landat. Den brukar komma med helikopter och sätts ner just där. Och det är stor uppståndelse, ljusslingor skall sättas och varselklädda arbetare har redan gett sig in bland grenarna och står och river i ljusslingorna. De förgyllda sjöhästarna, på en av de fyra fantastiska flaggstängerna på torget, kan bara titta på uppståndelsen. Det blåser kraftigt detta år så det är en "kamp om ljuset". Radiojournalisten förmedlar med spänning i rösten, att julgranen är här ...

ŝarĝoplanko aspektas malplena krom kelkaj travintrintaj studentaj ursetoj kiuj estas alŝnuritaj al la kajuto de la ŝoforo. Manbalailoj disponeblas multe se bezonate, se temas pri purigado de la koboldostacioj. Jes, la julkoboldo devas esti preta por ĉio kaj la plej malbona estas en la Kristnaska Tago, kiam li devas forpurigi ĉiujn kristnaskajn donacpaperojn kaj ŝnurojn.

Meze de la kultura centro de la urbo, Pozidono envolvis sin en arbaron da kristnaskaj arboj sur placo Götaplatsen. La lumo brilas en la densaj kaj verdaj abioj.

La artmuzeo allogas per ekspozicioj kaj homoj promenas tie kaj ĉi tie. La Urba teatro ofertas siajn scenejojn kaj la Urba biblioteko havas diversajn agadojn, sed kie libroj tamen estas la bazo.

Estas iom vintre malvarme kaj la ĉielo estas parte blua. Mi pensas, ke Pozidono estas feliĉa pro ĉiuj kristnaskaj arboj, kiuj iom kaŝas lian nudecon tiel en la kristnaska tempo.



La koncertejo de Gotenburgo allogas per kornblovanta, feste vestita virino, kiu reklamas kaj ke la plej bona kristnaska donaco estas koncerto kaj ke virinoj bone gardas sian pozicion ludi latunan muzikon.

”Aĉetu bileton, alie oni ekbatos vin al la nazo, aĉetu bileton ĉar estas Kristnasko!”

När vi är på väg in mot Göteborg och har stannat vid ett av alla de oändliga rödljusser vi förundrat hur en ”Tomtetransport” också väntar på att få köra. Flaket ser tomt ut förutom några övervintrade studentnallar som sitter fastnajade på bilflakets stam. Sopborstar finns ”i plenty” ifall det skulle bli fråga om att städa på tomtestationerna. Ja, en tomte måste vara beredd på allt och allra värst är det på juldagen då han ska städa bort allt julklappspapper och alla snören.



Mitt i kulturens centrum i staden har Poseidon snott in sig i en skog av julgranar på Götaplatsen. Ljusstrålar i de täta och gröna granarna.

Konstmuseet lockar med utställningar och människor går lite här och var. Stadsteatern bjuder på sina scener och Stadsbiblioteket har en bred verksamhet där böcker är basen.

Det är lite vinterkallt och himlen är delvis blå. Jag tror att Poseidon är glad för alla julgranarna som något lite skyler hans nakenhet så här i juletid.

Göteborgs konserthus lockar med en valthornsblåsande, festklädd kvinna som gör reklam både för att den bästa julklappen är en konsert och att kvinnor hävdar sig väl i bleckblåsmusiken.

La julkoboldo elektis vojaĝi per varmaerbalono al la Centra Stacio en Gotenburgo.

luj scias kien vojaĝi kaj aliaj estas pli hezitemaj kaj maltrankvile serĉas ŝildojn kaj horarojn.

Ankaŭ abundas homoj, kiuj estas survoje ien, iuj serĉas trakojn kaj malpacience marŝas tien kaj reen, serĉante la ĝustan aferon por ili.

Aliaj sidiĝis kun taso da kafo kaj traktas kaj la vivon kaj la trajnojn kaj busojn trankvile. La sola nekutima afero en ĉi tiu tago estas, ke la julkoboldo venis kun varmaerbalono de la Norda Poluso kaj sidas kaj svingas en la korbo indulgeme al ĉiuj ĉe la stacidomo.



La evidenta kristnaska donaco devus ĉiam esti libro. Estas libroj por ĉiuj. Ekscitigaj libroj, faktaj libroj, receptlibroj, detektivaj libroj, libroj pri bestoj kaj naturo, romanoj, vojaĝaj gvidiloj, libroj pri unu aŭ la alia. Estas ankaŭ bonegaj infanaj kaj junularaj libroj, kaj la plenkreskulo, kiu ankoraŭ havas la infanecan menson, povas ĝui ĉi tiujn. Kraĵonoj kaj skrapgumoj, papero kaj kovertoj, taglibroj, ludoj, oficejaj provizoj, jes, preskaŭ ĉio, kio faciligas interkomunikadon en la vivo.

Ĉiu, kiu legas kaj skribas, multe pli facile komprenas, kiel aliaj homoj pensas pri aferoj. "Kiu estas granda kaj forta, tiu devas esti afabla", tio estas la devizo de la bildstria

"Köp en biljett, annars får du en snyting, köp en biljett för att nu är det Jul!"

Tomten valde att resa per luftballong till Centralstationen i Göteborg.



En del vet vart de ska resa och andra är mer tveksamma och tittar ängsligt efter skyltar och tidtabeller.

Det vimlar också av folk som är på väg någonstans, en del letar efter spår och går otåligt fram och tillbaka, letar efter det rätta för dem. Andra har slagit sig ner med en kaffekopp och tar livet och tågen och bussarna som de kommer. Det enda ovanliga denna dag är att Julmtenten kommit med luftballong från Nordpolen och sitter och vinkar i korgen med ett visst överseende över alla på stationen.

Den självklara julklappen borde alltid vara en bok. Det finns böcker som passar alla. Spännande böcker, faktaböcker, receptböcker, deckare, böcker om djur och natur, romaner, resehandböcker, böcker om än det ena eller det andra. Jättestora barn- och ungdomsböcker finns också, och den vuxne som har sitt barnasinne kvar kan också ha glädje av dessa. Pennor och suddgummin, papper och kuvert, dagböcker, spel, kontorsmateriel ja, nästan allt som gör livet lättare för att kommunicera med varandra.

Den som läser och skriver har mycket lättare att förstå hur andra människor tänker om saker och ting. "Den som är stor och stark måste vara

rolulo Bamse, kaj oni iĝas pli afabla kaj pli saĝa se oni legas. Tamen, la grava afero estas, ke oni legas...

La Kristnaska butikumado ĉiuokaze alvenis. Kiel la ŝildo diras, ĝojo ne ĉiam devas esti multekosta.

En ĉi tiu aparta vendejo, la julkoboldo dismetis praktikajn kaj amuzajn aĵojn, kiuj ne multe kostas.

Finfine, estas la penso, kiu gravas, se la donaco venas el la koro.



Unu estas blanka kaj la alia estas ruĝa! Kristnaskaj floroj estas plejparte ruĝaj kaj blankaj. Kaj tute ne forgesu aĉeti Kristnaskan floron al iu, kiu bezonas ĝin, kaj kaptu la okazon aĉeti unu ankaŭ al vi mem.

Gravas lasi la florojn brili en la malluma tempo de la jaro. Nur en marto ni povos vidi ke la tago plilongiĝas kaj pliheliĝas, ke la lumo venas, mirinda sento.

Kristnaskarbaj ornamaĵoj je la plafono, ĉe la enirejo kaj en la flora sekcio interne, la ruĝa koloro klare dominas. Oni ofertas tiom da tio, kio apartenas al Kristnasko. La kristnaska stelo kaj amarilido vere ricevis elstaran lokon, kiel la elektrajn kvarkandelingojn kaj ŝnurlumojn.

Vi vere povas esperi, ke brilos el ĉiuj fenestroj en la vintra nokto.

snäll”, det är seriefiguren Bamses paroll, och man blir bara snällare och klokare om man läser. Det viktiga är dock att man läser ...

Julhandeln är i alla fall på plats. Som det står på skylten behöver glädjen inte alltid vara dyr.

I just den här affären har tomten placerat ut praktiska och roliga saker som inte kostar så mycket.

Det är ju ändå tanken som räknas om gåvan kommer från hjärtat.



Den ena den är vit och den andra den är röd! Julens blommor är för det mesta röda och vita. Och glöm för all del inte att köpa en julblomma till någon som behöver den, köp en till dig själv också när du ändå är i farten.

Det är viktigt att låta blommorna lysa upp i den mörka tiden av året. Inte förrän i mars kan vi se att dagen längre sig och blir ljusare, att ljuset kommer, en underbar känsla.

Julgranskulor i taket, vid ingången och i blomsteravdelningen innanför är den röda färgen klart dominerande. Det har bullrats upp med så mycket som hör julen till. Julstjärnan och amaryllisen har verkligen fått en framskjuten plats, det har också elektriska adventsljusstakar och ljusslingor fått.

Man kan verkligen hoppas att det skall lysa från alla fönster i vinternatten.

Och här står jultomten och renen och får bära ödet av att de har blivit satta på kampanjpris mitt i köpruschen. Här står de bland

Kaj ĉi tie la julkoboldo kaj la boaco staras kaj devas porti la sorton esti metita sur kampanja prezo en la mezo de la butikumado. Ĉi tie ili staras inter kristnaskarabaj ornamaĵoj kaj muskoj kaj brilaĵoj kaj aliaj kristnaskaj ornamaĵoj.



Eble li pensas malantaŭ sia kampanja ŝildo, eble li deziras, ke li povus veni hejmen kaj kunpreni la boacojn. Al ies hejmo...

La julaj virkaproj kolektiĝis en angulo. Ili rigardas la amasojn da klientoj kaj divenas, kiu aĉetos unu el ili. Ili kaj deziras kaj ne deziras, ili komentas inter si, – se mi alvenos tie, ĉe "ili", mi forbatos la pordon, aŭ ili parolas pri sopiro al kristnaska hejmo kun paco kaj harmonio.

Ĉi tie vere estas "Paniko en la laborejo de Julavo", la julkoboldoj estis disĵetitaj en sia sekcio de la butiko. Unu estas griza kaj unu estas ruĝa, ruĝaj ĉapoj, grizaj ĉapoj kaj striitaj ĉapoj.

"Ho, ĉi tiuj klientoj" ili pensas rezigne, ili nur ĵetas kaj ĵetas nin tien kaj ĉi tien. "Kial ili agas tiel" ili demandas unu la alian dum ili provas rampi al siaj ĝustaj lokoj.

La Julavo staras apud la arbo ene de la granda butikcentro kaj pensas pri malnovaj tempoj. Li vidas la hodiaŭajn homojn sekvi la paŝojn de Mamono. Li bedaŭras la grandan

julgranskulor och mossor och glitter och andra julpyrdnader.

Kanske tänker han bakom sin kampanjskylt, kanske önskar han sig att få komma hem och ta renen med sig. Hem till någon ...



Julbockarna har samlats i ett hörn. Dom tittar på skarorna av kunder och gissar på vilka som ska köpa någon av dom. Dom både önskar och inte önskar, dom kommenterar mellan sig, – om jag kommer dit, till "dom" så sparkar jag ut dörren eller så talar de om en längtan till ett julens hem med frid och harmoni.

Här är det verkligen "Panik i tomteverkstaden", tomtarna har blivit kastade huller om buller i affärens avdelning för dom. En är grå och en är röd, röda mössor, gråa mössor och randiga mössor.





kristnaskan streson, kiu kaptas nin. Efektive, Kristnasko temas pri esti tie unu por la alia kaj fari aferojn kune.

Li pensas pri kantoteksto kiu tekstas:

*Kristnasko estas ĉi tie
kaj brilas paco sur la tero
La ĝojo estas granda
en la klaraj okuloj de infano ĝi vivas
Kristnasko estas ĉi tie
en niaj mallumaj landoj
Venu, ni tenu nin reciproke la manojn
kiam Kristnasko estas ĉi tie!*

Per ĉi tiu kristnaska babilaĵo ni volas deziri al ĉiuj niaj legantoj tre Gajan Kristnaskon kaj tre Feliĉan Novjaron!

Ni ankaŭ profitas ĉi tiun okazon danki vin pro ĉiuj komentoj, kiujn ni ricevis dum la pasinta jaro. Tio tre ĝojigas nin kaj igas nin deziri daŭrigi.

Ni profitas ankaŭ la okazon por bonvenigi novajn kaj malnovajn verkistojn kontribui al la daŭra eldono de la revuo sub la devizo: "Por kulturo kaj plezuro"!

Bonvenon venontjare 2025

La redaktoroj de Ora Ĵurnalo

Ni en la redakcio fieras pri vi kaj ni!



"Dessa kunder" tänker de uppgivet, dom bara slänger och kastar oss hit och dit. "Varför gör di på detta viset" frågar de varandra när de försöker kravla sig till rätta.



Tomtefar står vid granen inne i det stora köpcentret och tänker på gamla tider. Han ser dagens människor springa i Mammons fotspår. Han är ledsen för den stora julstressen som griper tag om oss. Egentligen handlar ju julen om att finnas för varandra och att göra saker tillsammans.

Han tänker på en sångtext som lyder:

*Julen är här
och lyser frid på jorden
Glädjen är stor
i ett barns klara ögon bor den
Julen är här
i våra mörka länder
Kom låt oss ta varandras händer
när Julen är här!*

Med detta julkåseri vill vi önska alla våra läsare en riktigt God Jul och ett riktigt Gott Nytt År!

Vi tar också tillfället i akt att tacka för all den respons vi fått under det gångna året. Det glädjer oss väldigt mycket och får oss att vilja fortsätta. Vi tar också tillfället i akt att välkomna nya och gamla skribenter att bidra till tidningens fortsatta utgivning under mottot: med "kultur och glädje"!

Väl mött nästa år 2025

Redaktionen för Ora Ĵurnalo